

REVUO

Monata Aldono al „Esperanto Triumfonta“

NUMERO 12

1923

NOVEMBRO

Semantoj.

*Ni eliras je matena horo,
Kiam brilas roze horizonto,
Plugi kampon, plugi por estonto,
Kio estas nia pen' — laboro.*

*Ni eliras je matena horo,
Kaj kun spin' klinita kampon ŝiras;
Sub piedoj ter' libere spiras,
Kaj ridetas al ni la aŭroro.*

*Poste semas, semas ni senlace,
En la nigran teron semon ĵetas. —
La ĉielon poste ni preĝpetas,
Ke la kampo nia kresku pace.*

*Kiam venos de rikolt' momento,
Novan semon havos ni en domo
Kaj atendos, ĝis ripozos homo
Por kun freŝa ĝin eksemi sento.*

*Ni eliras je matena horo,
Kiam roze brilas horizonto,
Plugi kampon, plugi por estonto,
Kio estas nia pen' — laboro.*

Stanislaw Braun.

**Tiu ĉi numero estas dediĉita ekskluzive
al literaturo de slavaj aŭtoroj.**



Fragmentoj.

Post kolera vintro ree alflugis printempo . . . sed ne ĝojon ĝi alportis al la plejmultaj loĝantoj de O. Pli kolere ekseverigis Malsato, kvazaŭ mokante la helan sunon, kiu vane penis ridetigi la konsumitajn vizaĝojn. Malsato kuniĝis kun Malsano, kaj hundoj kun egala fervoro disŝiradis sur la stratoj kadavrojn de malsatuloj, tifuloj kaj holeruloj. Stranga estas la homa koro: al ĉio ĝi povas alkutimiĝi. Kiu pensus, ke tiu sama koro, kiu tiomfoje disŝirigis pro elpensitaj suferoj en literaturajoj, nun tute ne resonigus la verajn, ne elpensitajn suferojn de homoj. Ne, tio estas ne tute vera: ĝi ne povas alkutimiĝi al suferoj de infanoj.

Cu vi vidas tiun ĉi homon, ĉu vividas, kiel indiferece li kun alia amaso da homoj trapaŝas la stratojn de la brua urbo preter la malgrandaĵoj infanoj, kiuj simile al bestidoj kuŝas en strata koto ĉe vestibloj de domoj tremante pro malvarmo? Sed ĉu vi povas enrigardi lian koron? Ĉu vi ne vidus tie konfuzegon pro tio, ke li kaŝite portas preter tiuj malfeliĉuloj peceton da pano por siaj propraj infanoj? Ĉu li ne memoros por ĉiam la voĉon de malvarmiĝinta malgranda homa estaĵo, kiu de mateno ĝis malfrua nokto seninterrompe plorkrias: „Mi volas manĝi!“?

*

*

*

„Kion vi alportis por manĝi, patreto?“ Ĉiam la sama renkonta demando.

„Panon, vidu kiel flava ĝi estas, vi povas imagi, ke ĝi estas kekso*),“ respondas la patro.

„Pli bone ni formanĝu ĝin sen ia imago!“

Ĉu vi solvis iam matematikan problemon dividi peceton da dis-eriganta duonmaiza pano je tri egalaj partoj, kiam du paroj da kontrolantaj okuletoj fikse observas tiun ĉi vian operacion? Kaj la patro ĉiam erartranĉas, lia peceto estas ĉiufoje pli malgranda, ol la du aliaj, sed oni devas pardoni al li tiun ĉi neprecizecon.

*

*

*

Pakaĵo el Ameriko! Vi ne scias, kiom da ĝojo ĝi povas alporti al infanoj. Tuta korto dum longa tempo parolos poste pri la feliĉuloj, kiuj ĝin ricevis. Unu belan tagon alvenas skolto aŭ skoltino kaj enmanigas avizon de ARA. Oni kuras por kolekti la dokumentaron, oni iras al la ARA oficejo, oni longe staras en la vico, kaj finfine la pakaĵo estas en la loĝejo.

*) Dolĉa kuka bakaĵo.

La tuta familio tuj fariĝas gekuiristoj. Ĉu vi povas prezenti al vi tian feliĉan, ĝojan tagon, ĉu vi spertis iam tian feston? Sed ne ĉiuj havas parencojn eksterlande, kaj ne ĉiuj parencoj estas pakajsendemaj. Kompreneble, se la parencoj povus vidi trans la montojn kaj limbarojn la rezultojn de sia sendaĵo, se ili estus kapablaj malgraŭ la distanco kunsenti eĉ por unu minuto la nesprimeblan ĝojon kune kun malgrandaj parencoj, ili ne preferas la bonan okazon, per malgranda elspezo aĉeti la grandan feliĉon por si kaj samtempe kvitigi sian parencon ŝuldon. Tamen feliĉaj estas eĉ tiuj, kiuj havas nesendemajn parencojn en Ameriko: ili havas almenaŭ esperon, kiu ne forlasos ilin ĝis la promalsata morto. Sed kion faros tiuj, kiuj en la vasta mondo havas neniun parencon, sekve neniun esperon?

* * *

„Papa! Rigardu, la poŝtisto alportis al mi Esperantan poŝtkarton el Newyork!“ ekkriis ĝoje la knabino. „Ŝajnas al mi . . . se mi ĝuste komprenas . . . jen vidu vi mem: Kara fraŭlino! Vi baldaŭ ricevos pakajon per ARA de pli feliĉa samideanino el pli feliĉa lando. — Kiel bele, kiel delikate ŝi skribas, papa!“ —

Ĉu oni elpensis jam korradiofonon? Ĉu oni jam eltrovis elektroondojn kunligantajn la animojn?

* * *

Granda vico antaŭ ARA-oficejo. Atendante oni interparolas.

„De kiu vi iom ricevos, regnano“, scivole demandas iu virino, „ĉu de frato aŭ de fratino?“

„De Esperantistinoj el la urbo Praha.“

„Ĉu tie loĝas viaj parencoj?“

„Ne, tute nekonataj al mi amikinoj.“

„Kial do ili sendis al vi pakajon?“

„Ĉar mi estas Esperantisto.“

„Sekve ekzistas ankoraŭ tiuj revemaj homoj, kiuj kredas, ke popoloj povos kompreni unu la alian per artefarita lingvo,“ diris iu studento. „Nia profesoro tute klare pruvis al ni, ke Esperanto — estas utopio, ke estas neeble kompreni unu la alian per tiu ĉi lingvo.“

„Ĉu via profesoro studis Esperanton?“

„Por kio li bezonus studi? Li estas lingvisto kaj antaŭe scias, ke artefarita lingvo ne povas ekzisti, tiel diras lia scienco!“

„Diru al mi, regnano, kiel viaj ‚amikoj‘ eksciis, ke vi estas ‚Esperantisto‘, estas ja malpermesite skribi ion sur la poŝtkartoj de ARA?“

„Mi alskribis nur unu vorton: samideano.“

„Ŝajnas, ke tio estas vere mirakla vorto; ĉu ĉiu rajtas uzi ĝin?“

„Ne, nur vera Esperantisto.“

„Kiel vi fariĝis tia, ĉu vi devis trapasi ian ekzamenon, elprovon?“

„Jes, tre longan elprovon de indiferento kaj mokego!“

*

*

*

Jen strangulo, — al kiu li skribas dankan leteron? „El mia tuta koro mi dankas vin, kara Majstro, D-ro Zamenhof, kiu vi trovis la solan kaj la plej efikan ŝlosilon al la koro de malsamlandulo kaj la fundamenton de tutmonda frateco . . .“

„Kion vi skribas? Li ja mortis jam delonge.“

„Li mortis? Por mi li estos ĉiam vivanta, dum vivos Esperanto . . . Sed mi cedos, mi skribos: Kara Majstro, ĉu vi aŭdas min, ĉu mi ne danku vin pro tiu granda ĝojo, kiu devenas el la konscio, ke ŝanceliĝas jam la obstinaj baroj venkitaj per via granda amo al la homaro?“

„Kaj tiuj, kiuj sendis al vi . . . Jes, ili nepre ankaŭ dankos lin, kiam per korradiofono ili eksentos la rezulton de sia ago: estas ja granda ĝojo ridetigi la vizaĝeton de infano. Kaj tre volonte mi dezirus esti sur ilia loko, dissendi kiel ili la ĝojon malproksimen, kalkuli la tagojn kaj pensi: Hodiaŭ ili ricevis ĝin.“

*

*

*

„Kion vi faras, mia knabeto?“

„Mi skribas poŝtkarton al Newyork al f-ino N. Hieraŭ mi vidis en kinematografejo skrenaĵon ‚Misteroj de Newyork‘, tre interesan . . . Kaj jen mi petas la fraŭlinon, ŝi ja ne rifuzos, diri al Helen kaj Klarel, la geherooj de tiu ĉi bildo, ke ili skribu al mi pri siaj impresoj tie . . . sur la turo, kaj ĉu vere estis tiel danĝere tie . . .“

Fiere ridetis la patro: lia etulo certe ne dubas pri la potenco de Esperanto.

*

*

*

„Vi ion verkas, mia birdeto?“

„Jes, mi verkas muzikaĵon, kiu certe plaĉos al vi, ĉar ĝi esprimas la potencon de l' ideo, kiu unufoje naskiĝinta inter malharmonio kaj malpaco venkos ĉiujn malhelpojn kaj finfine harmoniigos la malpacemajn sonojn . . . Mi pensas, ke la malproksima amikino, al kiu mi dediĉas ĝin, ankaŭ estos kontenta . . . Sed mi malĝojas, patreto: Ŝajnas al mi, ke estas hontinde, ke ni, laborkapablaj, neniam ĝis nun de iu akceptintaj . . . nun kvazaŭ almozuloj . . .“

„Diru al mi nur, flineto, se iam en via estonta, mi esperas, pli bona vivo, vi kapablas tiel same helpi al samideanoj, ĉu vi tiam forgesos la hodiaŭan momenton?“

„Kiel vi povas eĉ pensi, patreto, ke mi forgesos la amikan manon el trans la oceano? Neniam!“

„Vi trankviligis ankaŭ miajn dubojn: hodiaŭ mi estas tute fiera, ke mi estas Esperantisto.“

Diru al li, samideanoj, ĉu li estas prava aŭ ne?

La resentoj.

Dediĉita al mia amiko
P. Röder en Plauen.

Kennst Du das Land, wo
die Zitronen blühen? . . .

Al la vidita foje nuda land' floranta,
En kiu plaŭdas ĉiam ĉe la roka bord'
La blua mar' jen brile paca, jen bruanta,
Revokas min mistera, nevenkebla fort'.
En tiu lando sen malvarm' kaj sen glacio
La cipresaro verdas en la suna bril';
Kaj en printemp-arom' de l' blanka akacio
Sonetas dolĉe plej la najtingala iril'.

La nokt' pacigis ondojn de la mar' profunda,
Ekbrulas jen lampir' en herb' kaj foliar';
Kaj kiel sur velur' sur la ĉiel' senfunda
Al diamant' kaj or' similas la stelar'.
Tra la aer' de l' nokt' disfluis florincensoj,
De l' festa sonorado tremis melodi';
Al la ĉiel' kaj senfineco flugis niaj pensoj
Dum tiu sankta nokt' de l' reviviĝ' de Di'.
En unu angulet', kaŝita plej intime,
En griza ŝtonruin' de l' praantikva mur'
L' unua virga am' kunigis nin proksime
Kaj sonis la konfes' kaj la naiva ĵur'.
La bela nokt' por ni ne havis tute horojn,
Por ni ne estis la pasint' nek la estont',
La rav' de l' am' unua regis niajn korojn,
Kaj benis nin la mar', la ter', la tuta mond'.
Sed jen de la maten' la mola blov' zefira
Tuŝetis la surfacon de l' dormanta mar',
Kaj en flavroza lum' de l' matenruĝ' admira
Ekludis brile tuj, frustrante, la ondar'.
„Ĉu ne por ni radias nun la lum' ĉiela
Kaj en la val' ekfloris punce la papav'?"
Parolis ŝi, kiel mateno juna bela
Kaj min rigardis ame, plena de la rav', —
„Rigardu, kiel sur la mar' la viglaj mevoj
Senlace sekvas post la blanka vel', —
Al vi, al via am' nur flugas miaj revoj;
Vi estas mia viv', la sun', la sankta cel'!"
Kaj kredis ni plej firme, man' en man' irante,
Ke ne velkados rozoi jam sur nia voj',
Ke lumos nia sun', neniam subirante,
Kaj en la koroj vivos sen esting' la ĝoj'!

La jaroj pasis for. La nordĉielo pluva
Malgaje griza pendas super ŝia tomb' . . .
En mia laca kor', senĝoja kaj entia
Dolore sonas de l' pasint' la fata tromp'!
Kaj longe vagis mi, serĉante ree pacon
Por la anim' kaj pens', ripozon por la kor',
Sed ĉie la sopir' min sekvis trans la spacon;
En la malnova vund' ne ĉesis plu dolor',
Kaj releviĝas en la pens' la bildo kara
De la floranta land' kaj de la roka bord',
Kaj tien, al la sud', al la vasteco mara,
Nur tien logas min la nevenkebla fort'.

Originalo de A. Lavrov, Tjumen.

Balado pri la Vitra Monto

aŭ Fino de la libro pri amo.

De Jan Kasprowicz.

Sur pint' de l' Vitra Monto
Kastelo ensorcita
Kun ora staras sojlo,
Kun pordo orumita.

Kaj harpo dolĉ'-kantema
Troviĝas en kastelo, —
Sorĉita reĝidino
En ora ludas ĉelo:

„Mi kvankam estas bela,
Posedas la trezorojn, —
Sopir' neesprimebla
Plenigas miajn horojn.

Al harpo dolĉ'-kantema
Malkovras mi l' animon,
La kor' deziras mondon —
Ĉirkaŭe trovas limon.“

Ariĝas kavaliroj
Apud la mont-deklivo,
Bru' iras de l' flugiloj,
Bru' arĝentpluma, viva.

„Al mi, al reĝidino,
Minstreloj kantas ĥore;
Sed mi jam ĉesis ĝoji,
Gajeco estas fore.

Okulojn, blank-vizaĝon
Adoras kavaliroj.
Sed mi ripetas dume:
Ho veoj! Ho sopiroj!

Incitu per la spronoj
Viglecon de ĉevaloj,
Al mi, al reĝidino,
Rapidu el la valoj!

Sur vitra grimpu vojo,
Laŭ harpa voĉ' sonora:
Pomarbo ora kreskas
Apud pordego ora.

Pomarbo kreskas ora,
Ĝin gardas falk' envia,
Se vi forŝiros frukton,
Vi tiam estos mia.

Mi havas en kastelo
Multegon da trezoro,
Kaj larĝe mi malfermos
Misterojn de la koro.

Incitu per la spronoj
Viglecon de ĉevaloj,
Al mi, al reĝidino,
Rapidu el la valoj!“

Ariĝas kavaliroj.
Al Vitra Monto iras,
Kaj brilas la kirasoj,
Ĉevaloj kraĉospiras.

Ĉe l' brak' flugiloj zumas,
Fair-glavon ĉiu tenas,
Kaj morto post taĉmento
Kiel nebul' sin trenas.

Sur tomboj muĝas vento,
Kantema herb' tremetas,
La kanton reĝidino
Per ora harp' ripetas.

Forpasas jaro, dua,
Jam sepa komenciĝis:
„Ho venu, agloj miaj!
Por ĉiam vi disiĝis!“

En tomboj ĉiuj dormas
Kovrataj de nebulo,
De l' reĝidino kanton
Aŭskultas nur simplulo.

Aŭskultas nur simplulo,
Lin nobla logas faro,
Decidas li kaj linkon
Mortigas en arbaro.

Al fingroj siaj kroĉis
Ungegojn de la linko,
Al pint' de l' Vitra Monto
Li rampas en konvinko.

Ne brilas la kiraso,
Ĉeval' ne kvaĉospiras,
Al pint' de l' Vitra Monto
Li sola rampe iras.

Nek sentas li varmegon,
Nek tuŝas lin soifo,
Nur reĝidino — celo,
Nur reĝidin' — signifo.

Vi, nubo, pluve-safa
Lin ne kontraŭbatalos:
Li ĉu atingos pinton,
Aŭ en mallumon falos?

Sur pint' de l' Vitra Monto
Kastelo ensorcita
Kun ora staras sojlo,
Kun pordo orumita.

Kaj harpo dolĉ'-kantema
Troviĝas en Kastelo, —
Sorĉita reĝidino
En ora ludas ĉelo.

El pola lingvo tradukis *A. Saulewicz*.

Tri tradukoj el la serba popola poezio.

De Sv. S. Petrović, Oĥrid.

OJ ABSINTO, ABSINTETO...

Knabino al fraŭlo la ringon redonis:
„Jen la ringo, knabo, la miaj ne cin
[amas:
Nek patro, nek patrino, nek frato, nek
[fratineto;
Sed, knabo, ne mortigu la mian famon,
Ĉar mi estas kompatinda malfeliĉa
[knabino:
Mi bosilkon¹⁾ semas, al mi absinto
[kreskas.
Oj absinto, absinteto, mia maldolĉa
[floro!
Per ci miaj edziniĝgastoj ornamiĝos,
Kiam ili min malgajan portos ĝis la
[tombo.“

1) bosilko = serbe: bosiljak; ruse: bazilik; fr.: basilic; itale: basilica; lat.: ocimum basilikum; germ.: Basi-lienkraut. Tiu floro estas honorata de la ortodoksuloj.



MALFIDELECO.

Dio mortigu ĉiun kunulinon,
Kiu kredas al la vortoj de fraŭlo.
Vira kapo — branĉo folihava:
Frapu branĉon je la verda herbo —
Folioj defalas, kaj restas la branĉo...

Kaj kia estas la serena ĉielo,
Jen serena kaj jen malserena,
Tia estas la fideleco de la fraŭlo:
Dum li cin kisas: „Mi cin prenos,
[animo“,
Kaj post la kisoj: „Atendu ĝis aŭtuno!“
Aŭtuno forpasas, vintro komenciĝas,
Kaj li kun alia tiam parolas...

KARULO KAJ NEKARULO.

Por sukriĉa herbo roskovrita
La ĉevalo-blankulo sin paŝtas,
Ĝi sin paŝtas dum unu momento,
Kaj dum du aŭskultas kun atento,
Kiel knabino petas patrinon:
„Al nekarulo ne min donu, panjo,
Ĉar mi pliamas kun la karulo
Tra la verda arbaro iradi,
Min nutradi per la kratagberoj,
Akvon trinki de sur la folioj,
Ŝtonon malvarman sub kapon metadi,
Ol kun nekarul' en palac' promeni,
Sukeron manĝadi, en silko dormadi.“



Bakita kukurbo.

Rakonto de Elin Pelin.

Duŝko Dobroduŝkov, arkivisto ĉe la distrikta administrejo, foje alportis en la hejmon de l' prefekto dokumentojn subskribotajn. La prefekto kun sia edzino kaj siaj infanoj ĵus estis manĝanta kukurbon bakitan en la bakejo. Subskribinte la dokumentojn la prefekto detranĉis peceton de l' kukurbo kaj afable ĝin prezentis al sia arkivisto.

„Bonvolu preni, s-o Duŝko, vidu, kia bonega kukurbo! Ĝi estas iomete trobakita, sed tio ne estas grava, pardonu!“

„Mi dankas, mi vere dankas al vi, s-o prefekto!“ respondis embarasate la arkivisto, „mi tion ... mi ne ŝatas ilin.“ ...

„Kiel? Vi ja estas vilaĝano, mi pensas, kaj vi ilin ne ŝatas!?“

Al Duŝko estis ĉiam malagrade, kiam oni rememorigis al li, vole aŭ nevole, ke li estas vilaĝano. Li ruĝiĝis pro honto.

„Jes, sed ... mia stomako, sciu, s-o prefekto, malkutimiĝis de tiaj aĵoj,“ respondis li balancante nee sian kapon. Liaj okuloj nevole sin direktis al ĉi tiu sukerumita peco da kukurbo kun ruĝiĝinta kaj tenta, trobakita ŝelo, kaj en lia buŝo kolektiĝis salivo, kiun li ne kuraĝis gluti pro timo, ke oni komprenos lian malfortecon.

„Bonvolu preni, ne ĝenu vin!“ invitis lin afable la prefekto. „De tiom da jaroj mi ne manĝis bakitan kukurbon kaj tamen mia stomako akceptas ĝin.“

„Mi ne povas, s-o prefekto — malagrade estas al mia stomako, mi eĉ ne povas ĝin gustumi!“ rediris Duŝko kaj ekspensis: vidu, kia malĝentilulo mi estas, mi devis preni!

Kaj, por ke li ne estu plu tentata, li riverencis humile, diris adiaŭ kaj eliris. — Malĝentilulo mi estas, malĝentilulo! Kiam oni pelas vin — forkuru, kiam oni donas al vi — prenu, sed jen la kapo!

Kaj Duŝko malaprobe frapis per la fingro sian kapon. La bongusta peceto kukurba ekaperis antaŭ liaj okuloj, bela, varma, dolĉa kaj super ĝi flugis subtila, tenta vaporo.

„Verdire, se ekzistas io, kion mi plej ŝatas en la mondo, ĝi estas bakita kukurbo,“ li komencis pensi, marŝante tra la strato kun klinita kapo. „Mi manĝas ilin kiel porko. Ho, se ili ne havus tiel suspektigan nomon! Kukurbo! Ĝi vekas imagon pri simplulo, la diablo ĝin prenu! Estas io en la nomo, kio memorigas pri malsaĝulo, stulta vilaĝano. Oni diras: tiu ĉi aŭ tiu manĝas kukurbojn — forigu lin! — homo sen kulturo, simplulo, unuvorte: porko! Foje mi iros en la vilaĝon nur por manĝi kukurbojn! Malproksime de la homoj...“

Kaj lia fantazio komencas aperigi antaŭ li nur dolĉajn, belajn kaj aromajn kukurbojn.

De tiu ĉi tago Duŝko Dobroduŝkov fariĝis iomete maltrankvila kaj nervekscitita. La fantomo de la bakita kukurbo komencis persekuti lin.

Jen li sidas en la kancelario laborante; lia penso maltrankviligas lin. Jen li ion skribas, li skribas ĝis laciĝo. Sed al li ŝajnis, ke la plumo, kiu grincas sur la papero, flustras al li: kukurbo, kukurbo, kukurbo ...

Se li kolerus al iu el siaj kolegoj de la kancelario, li nomus lin aŭ „bakita kukurbo“ aŭ „kial vi ruĝiĝis kiel bakita kukurbo“ aŭ „jen kia ebriulo vi estas — via kapo vaporiĝas kiel bakita kukurbo!“

Nokte, tuj kiam li ekdormis, la turmenta fantomo de la kukurbo ankaŭ venas. Li sonĝas pri kampo, sed kia kampo! Longa, larĝa, ĝian finon oni ne vidas. Sur ĝi estas rulamasigitaj nur bakitaj kukurboj kaj super ĉiuj flugas dolĉa vaporo! Kaj Duŝko marŝas tra tiu ĉi kampo, rigardas la kukurbojn, li deziras deŝiri unu, sed tuj kiam li kliniĝis, la kukurbo malaperas. Li denove marŝas tra la kampo. Kampo, tamen ne kampo, sed kvazaŭ ia kancelario, larĝa kancelario. Tie ĉi ekaperas granda kukurbo kaj komencas ruliĝi al li, kaj ĝi pligrandiĝas, pligrandiĝas; ĝi fariĝas granda kiel domo, kiel preĝejo, kiel monto, pli granda, pli granda kaj komencas pli rapide kaj pli forte ruliĝi al li. Duŝko tremas pro timo kaj forkuras, forkuras, kaj liaj piedoj mallongiĝas, mallongiĝas ... la monstra kukurbo atingas lin kaj sin ĵetas sur lin ... La arkivisto ekstremas kaj vekiga ŝvitokovrita.

Tiaj sonĝoj turmentadis lin ĉiunokte.

Foje vespere la skribistoj de la distrikta administrejo aranĝis festenon.

Ili bakigis manĝaĵon ĉe restoraciisto kaj kunvenis por gajiĝi.

La manĝaĵon oni spicis per pipro, por ke oni povu trinki pli multe da vino.

Kompreneble, estis invitita ankaŭ nia arkivisto.

Vinon! Paroladojn! Kantojn! Amajn kantojn laŭdezire kaj alterne patriotajn. Ili forgesis eĉ ne unu kanton el la kantaro. Fine ĉiuj trinkis toston. Unuj trinkis por la sano de la prefekto, je la kondiĉo kompreneble: „donu pli altan salajron“; aliaj por la bela sekso en la urbo; triaj por Bulgarujon; por la princo; por la bulgara popolo; por la puloj en la kancelario ktp.

Fine leviĝis s-o Duŝko, suriris seĝon, ektusetis, kaj plena je inspiro levis la glason.

„Sinjoroj, estimata kunvenintaro, kolegoj, bonaj miaj kamaradoj!“

Sed dum tiu ĉi vortorento en lia penso senceremonie ruliĝis tiu terura bakita kukurbo, kiu tiel senĉese persekutis lin kaj miksis en lia kapo la arkivon de ideoj, kolektitaj dum 13—14-jara ofico.

Al Duŝko estis malfacile komenci. Li faris fortan geston per la mano, kaj kiam li levis ĝin al la plafono, li solene tenis ĝin kelke da minutoj kun okuloj entuziasme fiksitaj sur liajn kamaradojn.

„Je egala piedo, tiel diri ... parte ... supre — malsupre ...“

Sed la kukurbo ankaŭ traruliĝis en la rivero de liaj pensoj. Duŝko eksentis sin tute senforta. Li mallevis sian manon, turniĝis al siaj kamaradoj kaj ekparolis per mola, sentoplenta kaj dolĉa voĉeto, malproksime de oratora patoso:

„Ĉu vi scias ... sinjoroj: ĉu vi deziras baki foje kukurbon? Jen, kamarado! Ĝi ne kostas, Dio scias, tro multe! Kaj ankaŭ ni ĝoju!“

Ekestis mallonga silento. Poste ĉiuj ekkriis „hura“, kaj la restoracio ektondris de aplaŭdo.

„Akceptita! Akceptita!“

„Ankoraŭ tiun ĉi vesperon!“ ekkriis iu voĉo.

„Akceptita-a-a-a-a!“

Kaj dum kvin minutoj ili kolektis monon, aĉetis kukurbon kaj sendis ĝin en la bakejon.

Duŝko ekprofundiĝis en feliĉaj pensoj.

Kaj kiam post unu horo la kukurbo estis bakita, li ekdeziris mem alporti ĝin kaj li eliris. Sed ...

Ĝuste kiam li estis revenanta kun la ujo, el kiu la bakita kukurbo ĉirkaŭsendis aromon, lin renkontis la prefekto.

„A! A! S-o Duŝko!“ li diris al li. „Vi bakis kukurbon! Mi ĝojas, vere mi ĝojas! Kredeble via stomako jam pliboniĝis.“

Duŝko „glutis sian langon“ kaj nenion povis diri.

Kiam li alportis la kukurbon al siaj kamaradoj, ili ĉiuj rimarkis, ke li paliĝis kiel mortinto.

„Kio okazis al vi?“ demandis lin ĉiuj kun miro.

„Iel malbone estas al mi,“ respondis Duŝko, kaj senforte falis sur seĝon en angulo kaj restis tie malgaja kaj muta.

Enprofundiĝinte en ĉagrenaj meditoj, li eĉ ne ekrigardis siajn kamaradojn, kiuj kun plezuro kaj ĝojo manĝis la dolĉan kukurbon.

„Duŝko, prenu, fraĉjo!“ ili invitis lin.

„Mi ne havas apetiton!“ li rediris malgaje kaj plorvoĉe. „Malbone estas al mi, tro malbone, knaboj! Mi mortos!“

El bulgara lingvo tradukis
G. Donĉev, Tirnovo.



Aventuro de Aristokles.

De H. Sienkiewicz.

Akrizione, edzino de Ktezip, barbiro el Eginio, estis ordema mastrino sed iomete malpurema virino, kiu tamen bone regis siajn sklavojn kaj edzon. Vidinte lin foje reveni ŝanceliĝanta kun nekonata homo, ŝi tuj elkuris el la domo kaj, apoginte la manojn sur la koksojn, komencis demandi:

„Kian altegulon vi kondukas kun vi? Mi vetos je du draĥmoj, ke vi ree aĉetis sklavon.“

„Trankviliĝu, mi petas,“ respondis la humila Ktezip. „Vi scias, ke por la gastservado mi bezonas tri homojn, kaj Kaljas tre maljuniĝis. Hieraŭ li pikis Arihtas-on per tondilo en la maldekstran orelon, kaj pro tio Arihtas ne volis pagi por la tondado. Tio ja ne povas daŭri . . . mi devas aĉeti iun por la helpado, mi do aĉetis kaj . . . mi malkare aĉetis . . .“

„Kaj por fini la marĉandon vi ebriiĝis kun tiu, kiu vin trompis? . . .“

„Neniu min trompis. Lin vendis al mi ia tre deca spartano . . . Pollis . . . jes! Pollis ne estas simpla homo, ĉar li diris al mi, ke li revenis el Sirakuzo, kie li estis sendito al tirano Dionizius, kiu ĵus donacis al li ĉi tiun homon.“

„Li estis do stulta, ĉar li prenis la sklavon senpage, sed vi estis eĉ pli stulta, ĉar vi pagis por li. Sufiĉos nura ekrigardo, por konstati, ke li estas mallertulo.“

„Ĉar li suferis je marmalsano! Sed ekrigardu nur liajn vizaĝon kaj ŝultrojn. Junulo, kiel kverko! Li nur iomete sin nutru . . .“

„Jes, nutru! Nun estas kvar, dank' al via saĝeco, parazitaj, kiuj dum semajno pli multe manĝas kaj trinkas, ol ili gajnas dum monato.“

Post tiuj ĉi vortoj, rigardinte la sklavon kolerokule, ŝi subite demandis:

„Kial vi min rigardas kiel kapro la akvon?“

La sklavo kliniĝis kaj respondis:

„Mi min elaĉetos, sinjorino . . . mi devenas el bona familio, kaj mi havas riĉajn amikojn.“

„Je Ateno Ergara“, ekkriis Akrizione, „mi jam konas tiujn ĉi ‚bonajn‘ familiojn kaj ‚riĉajn‘ amikojn. Ĉiu novaĉetita sklavo diras la saman, por ke oni lin plenstopu per manĝaĵo kaj ne pelu lin al laboro. Kiu vi estas?“

„Mi estas atenano, sinjorino, filo de Ariston el Kolit. Mia nomo estas Aristokles kaj kromnomo, kiu eble atingis viajn orelojn . . . Platon.“

„Platon? Mi ĝin aŭdas la unuan fojon! Kaj ĉu vi scias tondi kaj razi?“ — „Ne, sinjorino!“

Jen Akrizione returnis sin al la edzo:

„Mi jam antaŭe sciis, ke li por nenio taŭgos . . .“

Esperantigis Amin.

„Propaganda“ vespero.

El „Babiladoj de bonhumora Zamenhofano“, nova serio.

Jes, mi pentas.

Kion mi povas fari? Ĉiu homo eraras kaj pekas. Nur la papo en Romo estas senpeka. Kaj mi ja estas simpla mortonto. Mi ankaŭ eraris, sed nun pentas kaj volas publike konfesi mian pekon.

Do, mi estis . . . idisto! Verdire, nur kelkajn semajnojn, sed tamen mi estis idisto. Terure, ĉu ne? Sed feliĉe unu okazintaĵo en nia idista societo returnigis min sur la ĝustan vojon kaj mi denove estas verdstelano. Kaj pri tiu okazintaĵo mi nun rakontos al vi, miaj ĉarmigantaj samideaninoj kaj ĉarmigataj samideanoj.

Tio estis antaŭ nelonge. Nia ido-societo, kies fervora ano mi estis, aranĝis propagandan vesperon por vigligi la movadon. Oni anoncis pri ĝi en la lokaj gazetoj kaj tute neatendite venis multe da personoj, ne-idistoj, plejparte gestudenta junularo. Tio nin tre ĝojigis, ĉar oni ja scias, ke la junularo estas plej facile konvertebla. Mi venis akurate je la fiksita horo kaj, ekvidante la multnombran publikon, mi kortuŝe ekĝojis kaj dankis al la bona Dio, tiel favoranta nian movadon. Salutinte la konatojn, mi tuj enkuris la estrarejon, kie devis esti ĉiuj partoprenontoj en la programo de l' vespero. Kiam mi enkuris la ĉambron, mi ekvidis, ke ĉiuj estraranoj kaj partoprenontoj en la programo estas ekscititaj, iliaj vizaĝoj ŝanĝiĝis laŭ ĉiuj koloroj de la ĉielarko; jen ili ruĝiĝis, jen bluiĝis, jen verdiĝis, jen paliĝis.

„Samideanoj, kio estas?“ mi ekblekis.

„Hō ve,“ ekkriis la fervoruloj, „la du ĉefaj parolontoj de l' hodiaŭa vespero ne venis, kaj nun ni ne scias, kion fari, kiu anstataŭos ilin. Karulo, eble vi anstataŭos ilin, vi ja babiladis antaŭe ĉe la Esperantistoj, eble vi nun ankaŭ faros babiladon; la publiko ja tute egale ne komprenas nian lingvon, kaj tial vi certe havos sukceson.“

„Sed, aminduloj,“ mi respondis, „hodiaŭ ja estas propaganda vespero, kaj tio ja ne estus propagando, se mi babilus. Ne, ne, mi ne povas.“

„Ni vin elektos estrarano, se vi nur konsentos.“

„Ne, ne, mi ne povas, oni min priridos, kaj mi hodiaŭ ja ne estas razita, ne, ne, mi ne povas.“

„Do, kion fari, kion fari?“ ekkriis la estraranoj, kaj iliaj vizaĝoj eknigriĝis.

„Sinjoroj,“ ekkriis unu el la estraranoj, enkurinte la ĉambron, „la publiko malpacientiĝas, oni devas komenci, mi sonorigas!“

Kaj li eksonorigis, signalante tiamaniere la komencon.

„Nu,“ diris alia el la estraranoj, „la unua numero ja povas okazi laŭprograme. Samideano Kriegulov, bonvolu ekpaŝi

antaŭen, vi ja devas montri al ni vian talenton per la malferma parolado.“

Samideano Kriegulov, estonta advokato, sed nun ankoraŭ studento de juro, ekpaliĝis kaj eliris en la kunvenejon. Ekreginte sin, li kuraĝe surpaŝis la estradon. Komence la lango ne tute volis obei al li, kvazaŭ ĝi ligniĝis, kaj ankaŭ la pensoj, kiel li poste rakontis al mi, iel senorde kuradis en lia kapo, sed tamen iom post iom la lango komencis pli regule funkcii, nur iajoje ankoraŭ malobeante al li, kaj kio koncernas la senorde en la kapo diskurantajn pensojn, li sukcesis tamen ekkapti la plej grandan parton da ili ankoraŭ ĝustatempe kaj tuj ekvortigi ilin. Kvankam kelkaj gravaj pensoj tute perdiĝis kaj kelkaj frazoj ne eliĝis ĝustaloke, tion neniu atentis. Entute la parolado havis bonan sukceson, kaj oni sincere aplaŭdis s-on Kriegulov, kiu radiante iris de la estrado.

Intertempe unu estrarano, premata de zorgo pro la anstataŭigo de la venintaj parolantoj, sukcesis trovi en la salono inter la publiko konatinon, kiu antaŭ nelonge finis nian kurson, kaj li konfidis al ŝi siajn nigrajn pensojn.

La sinjorino ekkriis pro ravo kaj ekflustris: „Kara samideano, tio ja estas belega! Mi deklamos belan oklinian version, por ke la publiko ekkonu la belecon de nia lingvo.“

„Bonege, bonege!“ ekĝojis la estrarano kaj tuj ekiris kun la sinjorino en la estrarejon. Tie ŝi tre rapide provdiris la ok liniojn kaj faris nur du gramatikajn erarojn.

„Bonege!“ diris la estraranoj.

„Mi sonorigas!“ ekkriis la sonorigema estrarano kaj signalis.

„Bonvolu ekpaŝi antaŭen, sinjorino!“

La sinjorino ruĝiĝis kaj poste paliĝis. „Mi, mi . . . poste.“

„Ne, bonvolu komenci, oni ja sonorigis!“

Ŝi denove ruĝiĝis kaj denove paliĝis kaj fine ekiris. Jam starante sur la estrado ŝi kredeble ektimis, ĉar subite ŝi komencis forte tremi kaj, rapidege dirinte unutone la ok liniojn kaj farinte nur unu gramatikan eraron, ŝi iris de la estrado. Min tre interesis, kiu povis ŝin tiel ektimigi kaj mi ĉirkaŭrigardis la publikon, sed neniu el ili havis timigan aspekton; kontraŭe mi eĉ aŭdis, ke iu studento el la publiko diris al alia: „Aŭskultu, kolego, eble ni jam foriru. Mi timas. Ĉu vi scias, kion ĉi tiu sinjorino tiel terurige deklamis? Dio scias, kion plie ili faros kun ni!“

Sed en la sama momento oni denove sonorigis, kaj sur la estradon flugis ia beleta estaĵo kaj komencis kanti. La studento, kiu antaŭe intencis forkuri, nun restis kaj fikse ŝin rigardis. Estis evidente, ke lin ravis ŝia eksterajo.

Sed nun mi ektimis, ĉar estis ja klare, ke ĉi tiu studento havas emon enamiĝi en ĉiujn kabaredajn kantistinojn. Kaj, se li enamiĝos en ĉi tiun fraŭlinon, oni diros en la urbo, ke ŝi estas kabaredistino. Terure! Li, malfeliĉulo, ŝajne juĝas laŭ la vestaĵo kaj pensas, ke se iu tute honesta fraŭlino okaze surhavas tian

vestaĵon, ke ŝajne ŝi estas . . . malvestita, — ŝi vere estas . . . kabaredistino! Mi scias, ke tiu junulaĉo tiel pensas. Kaj poste nia societo malbonfamigis pro tio!

Kaj ekscitite mi enkuris denove la estrarejon por interkonsili kun la estraranoj, kio estas farota.

Sed intertempe la fraŭlino finis sian numeron, kaj enkurinte la estrarejon mi ekvidis, ke oni jam zorgas pri la sekvonta numero, t. e. parolado, kaj ke neniu estrarano volas anstataŭi la forestantan malsanan parolonton. Sed jen iu samideano diris:

„Mi havas ideon! Ĉi tie estas hodiaŭ gasto-samideano, ĵus veninta el Rusujo. Li parolu pri la disvastiĝo de nia ideo en Rusujo kaj pri siaj militaj travivaĵoj!“

„Bonege, la ideo estas brila! Vi estas geniulo!“

Oni tuj serĉis la gaston en la salono, venigis lin kaj proponis al li paroli. Li rifuzis kaj diris, ke neniam ankoraŭ li parolis publike kaj ke li povas nenion rakonti pri la idista movado en Rusujo kaj siaj militaj travivaĵoj. Tamen la estraranoj nepre insistis, ke li parolu. Li petis, ke oni lin indulgu, ĉar se li malsukcesos, li hontos. La estraranoj tamen ne ektimis kaj certigis lin, ke li sukcesegos kaj la societo neniam forgesos tiun servon. Kiam li tamen ne volis konsenti, oni komencis kune kun li iri en la salonon kaj fine oni lin duonserce, duonserioze elpuŝis el la koridoro en la salonon. Tiu strategia manovro de niaj estraranoj havis bonan sukceson, ĉar li nun vole-nevole ekpaŝis sur la estradon. Ni ĉiuj eksilentis, kaj mi jam antaŭguis la belan interesplenan paroladon. Kaj jen li komencis:

„Estimataj gesinjoroj! . . . Gesinjoroj! . . . Jes, gesinjoroj! Okaze troviĝante ĉi tie kiel gasto, mi volus rakonti al vi miajn militajn impresojn . . . t. e. ne . . . mi volus rakonti pri nia movado en Rusujo . . .“

Li haltis, ekspiris kaj daŭrigis: „Jes, do en Rusujo mi vidis kelkajn samideanojn, kiuj . . . kiuj nenion faris . . . ne . . . ne . . ., kiuj volas labori post la milito . . .“

Li denove haltis kaj ĉirkaŭrigardis la publikon. Pasis kvin sekundoj, dek. Estis videble, ke li streĉis ĉiujn siajn fortojn por koncentrigi siajn pensojn kaj daŭrigi la paroladon. Kaj jen li jam estis ekparolanta, kiam subite el la publiko iu ekridis, aliaj sekvis.

Mi ekrigardis kaj ektimis; ridis nur niaj samideanoj, la gastoj sidis kvazaŭ alnajlitaj kaj ne sciis kion fari, sed ne ridis. La parolanto eĉ pli konfuziĝis kaj ekbalbutis:

„Internacia lingvo . . .“ Kio estas internacia lingvo, kredeble vi ĉiuj scias kaj mi ne parolos pli detale pri tio . . .“

Denove ridego de la samideanoj. Kaj tomba silento de la gastoj.

Mi ekflamiĝis, miaj vangoj brulis de honto, de honto pro tia konduto de l' samideanoj, kaj mi rampis el la salono tra la koridoro en la estrarejon, por priparoli kun la estraranoj, kiamaniere la malfeliĉa parolanto estu savata kaj por esprimi mian indignon pri la konduto de la idistoj.

Enkurinte la estrarejon, mi trovis la pordon fermita, do mi forte premas la mantenilon, la pordo malfermiĝas kaj . . . ho, teruro . . . jen estis s-o Kriegulov, la sekretario, kaj fraŭlino Amegulinov kaj . . . Ne, ne, tio estas tro terura, mi ne rakontos, kion mi tie ekvidis. Mi nur ekkriis: „Malfeliĉuloj, kion vi jen faras . . . kaj kio estos kun i d o?“

Kaj brufermite la pordon mi rekuris, kvazaŭ freneza, ekscitita kaj indignegita en la salonon. Tie la gasto-malfeliĉulo dume sukcesis diri unu plian frazon.

„Pri la historio de nia lingvo . . . la historio de nia lingvo estas tre mallonga . . .“

Kaj li denove haltis, konfuzegite, dum la samideanoj ridegegis. Estis evidente, ke pro tia konduto de la samideanoj la nepreparita por la parolado gasto ne povos jam ordigi siajn pensojn; kaj kiu scias, kiel ĉi tio finiĝos?

Sed jen feliĉe post kelksekunda silento, li diris: — „Jes, tio estas ĉio, kion mi volis diri“ —, kaj hontante li iris de la estrado.

La samideanoj ĝojege aplaŭdis, la gastoj mirigite silentis.

Mi min denove direktis en la estrarejon, por fine malpezigi mian indignitan animon. Sed tie jam estis ĉiuj estraranoj, kaj ili reciproke sin insultis, kriis kaj fulmotondris.

Precipe buŝlaboris s-o Kriegulov, kriante: — „Vi ne estas samideanoj! Nur mi estas samideano! Nun neniu plu parolu antaŭ la publiko, nun mi fermos la vesperon per voĉlegado de ĉia versaĵo!“

Kaj antaŭ ol ni povis rekonsciigi, li elkuris en la salonon, kaj post unu sekundo ni jam aŭdis en la estrarejo, ke li tondra-voĉe deklaras al la publiko, ke li fermos la vesperon per versaĵo.

Tio ŝajne efikis, ĉar la gastoj terurigitaj per la antaŭa deklamado, ĉarmitaj per la kostumo de la kantistino kaj mirigitaj per la ĵus aŭdita parolado, nun ekvidante la furiozan vizaĝesprimon de s-o Kriegulov, kredeble plene konvinkiĝis pri la uzebleco de nia lingvo por ĉiuj cirkonstancoj kaj vivokazoj kaj komencis foriri el la salono.

Kaj nun komenciĝis la „programo“ en la estrarejo. Ĉiuj parolis, kriis, komentariis, argumentis, rezonis kaj kulpigis unu la alian. Tamen estis kelkaj, kiujn eĉ kontentigis la vespero, ekz. fraŭlino Amegulinov, kiu certigis ĉiun aparte, ke la ferma parolado de s-o Kriegulov estis bonega . . .

Mi ne intencas plu rakonti al vi, kio plie okazis en la estrarejo. Por vi, tio estus tro teda, kaj por mi tro doloriga. Mi nur diru, ke la sekvintan tagon mi sendis al la societo mian eksigon, kaj nun mi revenis al Esperanto. Ĉe ni, Esperantistoj, io simila ja ne povas okazi, en Esperanto-societo tia afero tute ne estus ebla, ĉu ne? . . .

. . . . Kion, vi, sinjoro, diras . . .? Vi estis en Esperanta societo, kie okazis precize la samo, pri kio mi rakontis? Ne, ne, vi eraras, sinjoro. Tio estas neebla. Ne atentu ĉi tiun sinjoron, gesamideanoj, — estas malvero, kion li diras, malica malvero, mi ĵuras al vi je mia barbo!*)

Joŝo.

*) En la lasta momento, kiam la tuta artikolo jam estis prespreta, ni sciigis, ke s-ano Joŝo tute ne havas barbon. Nin do tre mirigas lia barb-ĵuro, kaj ni ne komprenas, kion li intencis per ĝi. — Rim. de la redakcio.

Enigmoj.

1. Kiam li eliris, granda arbo detruigis kaj je ia ujo transformigis. Salko, sako.

2. Donu al mi voston, por ke mi povu forflugi kaj liberiĝi el inter viaj dentoj; rekompence, mi vizitados viajn printempojn kaj kantados en viaj arbaroj. Kuko, kukolo.

3. Ĉasisto pafmortigis beston, korvoj forportis ĝian ventron, per la restaĵo la ĉasisto ĉirkaŭvolvis sian kolon kaj foriris. Sakalo, ŝalo.

4. Besto vivis vegetaĵan vivon: vento la voston deŝiris — besto libere forkuris. Lupo, luplo.

5. Ne preferu karan benon, ĉar ĝi servas por mortigo. Karabeno.

6. Maljuna religia ĉefo estas floro. Papavo.

7. Kun p nacio estas arbo. Polo, poplo.

De Doĉo T. Stanev, Sevlievo.

Solvoj de la enigmoj el la lasta numero:

Solvo de la nombra enigmo.

Budapeŝto
UEA
Dueto
Abato
Poŝto
Et
Ŝedo
Tapeto
O

**Solvo de la geografia silab-
enigmo.**

San Salvador
Addis Abeba
NankinG
Salamanca
IspahaN
Brindisi
AgadiR
RhodoS
Sansibar. — Srinagar.

